SVEDA ESPERANTOFEDERACIO
Tegelbacken Stockholm
Komunikо 1/1944 la 17 februaro 1944

RAPORTKARTOJ

La kluboj raportu kiom eble plej baldaŭ pri sia nova estraro ktp. per raportkarto SEF 10, kiun ni sendas aldone. Sendu kopion al la distrikto kaj konservu alian por la kluba arkivo. La distriktoj raportu per siaj kartoj pri la nuna stato. Estus grave se vi ĉiuj tuj raportas, ĉar baldaŭ la matrikulo estos pretigata. La raportkarton vi povas sendi kiel poŝtkarton se vi volas.

RAPORTBLANKEDOJ

Ni sendas al la klubo j novajn raportblankedojn. Forĵetu la malnovajn blankedojn! De 1944 nur uzu la novajn! Raportu kvarongjare pri kunvenoj, kursoj, viziteoj ktp. Tiuj raportoj kaj proponoj al la federacia estraro kaj mendo de provaĵoj volonte sur la sama papero. Sendu kopion al la distrikto kaj konservu alian por la kluba arkivo. La raportoj tiuj n la klubo j sendas al SEF, ataras ĵe dispono por la redaktoro de Svenska Esperanto-Tidningen. Tial ne estas necese ke vi aparte raportas al la redaktoro. Do, la raportoj al SEF aperos en Sveda Kroniko, se la klubo ne sendis specialan raporton al la redaktoro de nia organo.

MATRIKULO 1944

En marto aperos la matrikulo. Ĝi estos stencilita kaj enhavos adresojn de la federacia estraro, de distriktoj kaj grupoj, de grupaj kaj rektaj membroj. La grupoj ricevos 5 ekz., distriktaj estraranoj kaj rektaj membroj 1 ekz. Vi ankaŭ povas antaŭmendi plurajn ekzemplerojn per pago de po 20 öre al nia poŝtkonto 2012 (mencio pri kio temas).

LA JARKOTIZO

La jarkotizo estas por rektaj membroj 7,50 kronoj kaj ili ricevas la gazeton. Grupaj membroj pagas 2 kronojn. Jarkotizojn oni ensendu al nia poŝtkonto 2012 antaŭ la 31 marto. La grupaj kasistoj samtempe ensendu kopiojn de la membrokartoj. Se vi sendas multajn kartojn, vi povas sendi kiel "Affärshandlingar" en nefermita koverto kun 20 öre afranko. Mendu novan blokon da membrokartoj antaŭ ol la malnova estas eluzita.

SEF-KONGRESO 1944

La jarkunveno 1944 okazos pentekoste en Karlskoga, kien invitas nia la esperantosocieto "La Aglo", Karlskoga. La kongreskotizo estas 2,50 kronoj. La adreso estas:

SEF-Kongressen, Karlskoga
Ragnar Lindahl
Box 4646
BOFORS

Aldone: Raportkartoj SEF 10, raportblankedoj SEF 4.

SEF. 2.44.150